# *Registaro de Xinjiang akuzas okcidentajn landojn pro malstabiligaj agoj kontra? ?inio*



Pekino, mar 29 (RHK) La heroldo de la registaro de la a?toktona regiono ?ina Xinjiang, Xu Guixiang, deklaris ?i-lunde ke Usono, Britio, E?ropa Unio kaj Kanado utiligas politikan manipuladon por malstabiligi ?inion, la? raportas Reuters.

La reprezentanto rifuzis la akuzojn pri tio ke en la regiono oni plenumas “genocidon” kaj kondamnis la punojn trudatajn de tiuj landoj kontra? civitanoj kaj institucioj de la azia giganto kiel sekvoj de la supozataj perfortoj de homaj rajtoj kontra? la islama minoritato uigur en Xinjiang.

Xu anka? emfazis ke li havas neniun obstaklon por ke la entreprenoj vizitu la kampojn de kotono de Xinjiang, la plej granda kotona regiono de ?inio, meze de la akuzoj de supozataj perfortoj de homaj rajtoj kaj uzo de “perforta laboro”.

La okcidentaj registaroj akuzas ?inion reteni milionon da personoj apartenantaj al la islama minoritato uigur en reedukaj kampoj.

Pekino, siaflanke, rifuzas ?iujn akuzojn de perforto, klarigante ke la kampadejoj estas centroj por profesia klerigado kaj estas parto de la klopodoj por batali kontra? terorismo.

?i-lunde, ?inio punis 10 civitanojn kaj kvar instituciojn de la E?ropa Unio, pro “dama?oj gravaj al la suvereneco kaj la interesoj” de la lando, samkiel pro “malica disvastigo de mensogoj kaj misinformoj”. Poste, Pekino anka? punis civitanojn kaj instituciojn de Britio, Kanado kaj Usono.

Fonto:RT

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/252229-registaro-de-xinjiang-akuzas-okcidentajn-landojn-pro-malstabiligaj-agoj-kontrau-cinio

**Radio Habana Cuba**